Jag vill i detta sammanhang fästa uppmärksamheten på den under närmaste tiden utkommande boken "Huru leder man en fortsättningskurs i Esperanto?". Fortsättningskursens organisation har vållat mycket huvudbry. Med den stora omfattning som nybörjarekurserna haft särskilt inom A. B. F. har kravet på välorganiserade fortsättningskurser blivit allt starkare, ty det är ju inte nog med, att en mängd nybörjare-

kurser sättas i gång. Det är i fortsättningskurserna som de verkliga esperantisterna skapas.


Skulle tveksamhet råda om bästa sättet att leda kurser, och är det någon, som vill ha upplysningar i denna fråga, så tillskriv folkskollärare Einar Dahl, Ridhusgatan 6, Uddevalla, som lovat att stå till tjänst. För att kunna få en samlad statistisk uppgift på kursernas antal och omfattning vädja vi till esperantisterna att till hr Dahl insända rapport om de kurser, som komma till stånd. I förhoppning om en givande studiesäsong 1933—34 riktas den maningen till alla och envar: Full Fart Framåt, Ĉiam Antaŭen!

La Studgvidanto.



Hur skall jag göra?

Äntligen har esperantorörelsen ordnats rationellt! Nu blir jag medlem i U.E.A. genom att ansluta mig och rösta för min klubbs anslutning till Svenska Esperanto-Förbundet.




Var och en som ansluter sig till S.E.F. äger alltså rätt att erhålla hjälp av U. E.A:s delegerade i hela världen.

Fram för jätteanslutning!

Vem vill

hjälpa förbundet att göra reklam för den utmärkta och billiga korrespondenskursen? Tillskriv oss och begär behövt antal affischer och propagandablad. Gratis.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET



Leningrad: Tsarskoje Selo, Katarinapalatset.

Stockholm—Tallinn—Leningrad—Moskva.

I.

Esperanta Turista Komisiono en Svedlando dum kelkaj jaroj aranĝis plurajn turistajn vojaĝojn, en kiuj partoprenis ne nur esperantistoj sed ankaŭ kaj en sama grado ne-esperantistoj. Certe en tiuj vojaĝoj partoprenis 1000—2000 turistoj — grava propagando, kies pruvo pri la praktika uzebleco de nia lingvo estas de granda valoro. En ĉiu lando devas esti Esperanta Turista Asocio; tiuj entreprenoj enkondukas nian lingvon en oportunajn sferojn. — Ĉi-sube jen pri-skribo pri unu el la lastaj turistaj vojaĝoj.

Brile sukcesis tiu vojaĝo, kiun E. T. K. aranĝis fine de junio al Estonio kaj Ruslando. Kaj ĉiu el la 23 partoprenantoj, de la 20-jara junulo ĝis la 67-jara onklo, estis treege kontentaj.

Ĝi bele komenciĝis. Estis suno kaj blua ĉielo. "Kalewipoeg", nia blanka ŝipo, kvazaŭ cigno glitis tra sunbrilaj ondoj al la alloga celo. Kaj inter la homoj surŝipe regis vigleco kaj gaja humoro.

Sed la ondoj ekiĝas temperamentaj. "Kalewipoeg" ekkondukas iom strange kaj la gajaj homoj iĝas subite malpli gajaj. Nu, tiun ĉapitron mi diskrete preterlasu. Venontan matenon, kiam aperas ĉe la horizonto la turoj de Tallinn, ĉio denove estas en bona ordo. La unua etapo de la vojaĝo estas atingita.

Multaj estonaj esperantistoj sin trovis sur la kajo por nin bonvenigi, inter aliaj f-ino Helmi Dresen, sub kies gvidado ni en la posttagmezo pririgardis la urbon. Eĉ Hungarujo estis reprezentita en la akcepta deputitaro: S-ro Tibor Czitrom sin trovis inter la afablaj akceptantoj.

Tallinn "kaptis" nin de la unua momento. Ni vagis en mallargaj stratetoj, pririgardis malnovajn interesajn konstruaĵojn, "provis" la antikvajn droŝkojn kaj sentis nin kvazaŭ transportitaj en la mezepoko. Ni konatiĝis kun "Dika Margareta" kaj "Longa Herrmann", en kiu lasta ni eĉ suprengrimpis ĝis la tura supro, el kiu oni havas mirindan vidaĵon de la pitoreska urbo. Kaj en ĉi tiu mezepoka idilio ni trovis "funkis"-restoracion "Corso" kun ŝtalaj seĝoj, vitraj tabloj kaj orkestro ludanta svedan muzikon.

Ni ĉeestis la grandan kantfeston, aŭdis 20.000 kantistojn kanti kaj la estonan prezidanton paroli (bedaŭrinde ke li ne parolis Esperanton), ni banis, ĝuis en Pirita (ĉarma loko ekster la urbo) kaj ĉerpis forton por venontaj penegadoj.

Kaj en la hela somermeza nokto ni adiaŭis la estonan ĉefurbon kaj per la vagonaro "Ruĝa sago" rapidis al la "ruĝa" Sovjeto. Survoje tien ni faris mallongan viziton en Narva. La eta sveda armeo rapidege okupis la urbon, celis per siaj "pafiloj" fotografaj al la imponaj fortikaĵoj kaj post atako kontraŭ la stacidoma restoracio, kies provizo de

buterpanoj kaj trinkaĵoj rimarkinde malpliigis, oni daŭrigis la interesan vojaĝon.

Revolucio ĉe la rusa limo! Sed — ne timu — nur en niaj valizoj, kies enhavon renversis la severaj rusaj doganistoj. Pli afablaj estis la fervojistoj, kiuj ne nur plenumis sian fervojan oficon sed ankaŭ deĵoris kiel niaj instruistoj pri rusa lingvo. La instruado okazis laŭ "Ĉe-metodo" kaj mi kredas, ke la plezuro estis same granda por la instruistoj kiel por la lernantoj.

Sed pli facile digesteblaj ol rusaj vortoj estas rusa kaviaro kaj rusaj pirogoj. Kiu eble kredas, ke ni en Sovjeto suferis pro manko de nutraĵoj kaj komforto, tiu funde eraras. Ni loĝis kiel princoj inter pompaj mebloj de la cara tempo, dormis sur ŝvelantaj molanaslanugaj kusenoj kaj manĝis unuaklasan manĝaĵon.

"Ni mĉste ĉta mycket, mycket", (vi devas manĝi multe, multe) emfaze diris la svedlingve scianta ĉefkelnero en hotelo "Eŭropa" en Leningrad. Sed se ni estus manĝintaj tiom, kiom deziris la afablaj rusoj, ni certe ne estus revidintaj nian patrujon.

Malgraŭ oraj turpintoj, oraj kupoloj, ruĝaj standardoj, ruĝaj afiŝoj, ruĝaj tramoj, homplenaj stratoj Leningrad ŝajnas trista kaj griza. Ĉiuj homoj estas same simple vestitaj. En nenies vizaĝo estas trovebla esprimo de vivĝojo, energio.

Sed energio ne mankis al la svedaj turistoj, kiuj de mateno ĝis vespero rapidis de unu loko al alia. Oni faris inspektan rondiron tra fabrikoj, aziloj, laboristaj loĝejoj, sanatorioj, orĥejoj, kluboj. Oni vizitis la Ermitage-muzeon kaj la Vintran Palacon kun siaj valoraj artkolektoj, la grandiozan S-ta Isak-katedralon, nun transformitan je antireligia muzeo, oni ĝuis rusan baleton, kunvenis kun rusaj samideanoj kaj oni eĉ eniris la Peter-Paul-malliberejon, sed feliĉe ne por tie resti. Mallume, malvarme, silente kiel en tombo! Sed la dikaj ĉelmuroj rakontas pri inferaj turmentoj, teruraj suferoj. Oni ankaŭ pririgardis la masivan pordegon, kiun devis trapaŝi tiuj malfeliĉuloj, kiuj estis kondamnitaj je Siberia ekzilo.

Sed pli agrable iri tra kastelan pord-

egon, ektrovi ĉarman kastelon inter densfolia verdaĵo. Ensorĉe bela estas Peterhof, iam estra palaco, kiun konstruigis Peter I ĉe la Finna Margolfo. Fama ĝi estas precipe pro sia vasta parko kun oraj statuoj kaj mirindaj fontanoj, kun kiuj eĉ ne tiuj de Versailles povas konkuri pri beleco.

Multe pli ampleksa, ankoraŭ pli luksa estas Tsarskoje-Selo, kiu baldaŭ estos aliigata je ripoza hejmo por laboristoj. La tempoj vere ŝanĝiĝas. Nia vizito okazis en tiel nomata ripoztago (en Sovjeto ĉiu sesa tago estas ripoztago), kaj en la kastela korto laboristoj amuziĝis per dancado, dum du soldatoj ludis mandolinon kaj tirharmonikon. En arkado kun marmoraj kolonoj sidis ĉe tablego longa vico da rusoj, manĝante sian simplan supon kaj nigran panon.

Plej grandioza el la multaj konstruaĵoj de Tsarskoje-Selo estas la Katarina-palaco, konstruita dum la regado de Katarina II. Kia pompo, kia lukso en salonoj, salonegoj! Tamen ĉiujn superas la "Sukcena Salono", kies muroj de planko ĝis plafono estas kovritaj per briletanta sukceso, donaco de Frederiko la granda al Katarina II. Forte impresis la vizito en la Alexander-palaco, la loĝejo de la lasta caro, kie ĉio sin trovas en sama stato kiel en tiu tago, kiam li estis kaptata por neniam plu reveni sian hejmon.

(Sekvo venos.)

Ella Nilson.



Medlemsavgiftern i S.E.F.

Avgift för

- a) klubbar 25 öre pr kvartal pr medlem.
- b) enskilda 5:— kr. pr år (inkl. tidning)
(Obs.! Anslutning som sker fr. o. m. 1 sept. beviljas för 2:50 kr., varvid tidningen erhålles för hela andra halvåret 1933).

Anslut er omedelbart genom avgiftens inbetalning till

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET
Potsgirokonto 2012
Stockholm

Riksstudieledare tillsatt.



Einar Dahl, Uddevalla.

Styrelsen för Svenska Esperanto-Förbundet har beslutat tillsätta en riksstudieledare. Därmed är ett önskemål, som under senare år alltmer trängt sig i förgrunden, förverkligat. Man har insett behovet av en central, dit eventuella förfrågningar om kurser och studiearbetets rätta bedrivande kunna riktas.

Till innehavare av denna ansvarsfulla post har utsetts folkskollärare Einar Dahl, Uddevalla, och adressen är Ridhusgatan 6.

Riksstudieledarens uppgift blir således närmast att stå till råds i studiefrågor, uppläggning av studieplaner o. dyl. Driven och erfaren föredragshållare som hr Dahl är torde han vid behov även stå till tjänst med behövliga föredrag liksom han även nog torde kunna dra försorg om andra programpunkter.

Vi gratulera samideano Dahl i anledning av valet men vi tro med den kännedom vi ha om hans arbetskapacitet att rörelsen är mest att gratulera.



PORTU LA VERDAN STELONI

Nästa års kongress

i Stockholm kommer av allt att döma att samla minst 2000 deltagare. Från alla länder rapporteras att man väntar ovanligt stor anslutning. Och svenskar-na måste naturligtvis begagna sig av tillfället att i eget land träffa utlänningarna! Kongresskommittén planerar ett mycket gediget program med bl. a. teater av yrkesskådespelare.

Kongressavgiften är 25 kr., men vid inbetalning före den 1 april 1934 beviljas en lägre avgift av 20 kr. Desutom har beslutats, att svenskarna äga insända avgiften i 2 avbetalningar à 10 kr., under förutsättning att första inbetalning sker före 1 april 1934.

Ju förr anmälningarna inkomma, desto bättre kommer kongressen att kunna arrangeras. Underlätta alltså arbetet genom att snarast insända kongressavgiften, helt eller delvis.

26-a Universala Kongreso de Esperanto

Postgirokonto 50443.
Stockholm.



Seminaria kurso en Östhammar.

Oni ne povas diri pri Östhammar, ke ĝi estas granda urbo, sed oni ne povas nei, ke ĝi estas ĉarma urbo. Oni ne povis diri, ke la somera kurso de la esp. kursgvidantoj estis plennombra, sed oni ne povas nei, ke la spirito de la kurso, la kvalito de la patroprenintoj estis unuaranga. Mi mem, kiu — kun du pli indaj aŭtoritatoj, Redaktoro Nylén kaj Rektoro Jansson — gvidis la kurson, ĉiam volonte rememoros la mallongajn juli-aŭgustajn du semajnojn, kiam mi povis kunlabori kun la eminentaj kursgvidantoj kaj kun la eminenta dudeko reprezentinta vastan distancon de Svedlando de Kiruna ĝis Skanio. Vere mi ne instruis, sed kunlaboris. La programo de la kurso estis vasta: instrumanieroj, gramatiko, historio, literaturo, propagando, ekzamenoj ktp. — La gastamo de la Östhammar-anoj estis inda kadro de la kurso.

Szilágyi.

Pri "internacia stilo".

Ordinare estas tiel, ke esperantistoj, kiuj ne lernis iun el la "kulturlingvoj", subtaksas sian kapablon. Se ili scius, kiom malmulte scias tiuj personoj, kiuj asertas ke ili estras iun nacian lingvon, kompare kun tio kion ili mem lernis en sia studo de Esperanto, ili ne estus tiel modestaj. Legante la jenan eltiraĵon el letero de partopreninto en daŭriga esperantokurso, kiu dum nur du-tri jaroj studis la lingvon, oni ne povas ne miri pri la eleganteco kun kiu la lingvo estas pritraktata.

Kio estas la kaŭzo, ke vi tiel vere modele skribas Esperanton? —

Mi dankas Vin, sinjoro, pro la eldiro, sed — tiaj vortoj skribitaj por simpla laboristo-neinstruitulo, kiel mi, de tiel lerta kaj eminenta esperantisto — akademiano, certe estas troigo. Tre estimata, sendube Vi diris tion pro ĝentileco.

Vi aprobas miajn dirojn pri la malfacileco de Esp. por neinstruituloj. Mi ĝojas, ke Vi volas vidi la veron. Estante neinstruita laboristo, mi povas konfesi, ke mi ne troigas, dirante ke Esp. estas sufiĉe malfacila. Kiam, kiel la subskribinto, oni paŝeton post paŝeto devas nur per memstudado penetri en la labirintojn de Esperanto, oni povas diri, ke estas pena laboro, eĉ tre. Ke la gramatiko, la vortfarado ktp. estas simpla kaj facila, tio estas nerefutebla, sed — aliaj faktoroj malfaciligas la aferon. Ĉefe mi do pensas je la paroloj pri naciismoj, neologismoj, logiko, koncizo, principo de sufiĉo ktp.

Al profesoroj kaj lingvistoj la afero certe estas ludilo kaj interesaĵo, sed al ni simpluloj ĝi estas tre pena. Ni ne povas havi proprajn opiniojn ĉar nia lingvoscio estas tre minimuma, tial la plej multa (el nia uzo de Esperanto) fariĝas nura imitado. Al tio venas la fakto, ke la teoriistoj per siaj senfinaj rekomendoj rilate la plejbonajn kaj plejoportunajn esprimojn konfuzigas la mezklerulojn. Tio ĉiama rekomendado de pli bonaj esprimoj iom enuigas la studanton. Parte la "bonvolaĵoj" akcelas la aferon, sed la elekto ne ĉiam estas facila. Esperanto ne devus tiom konsisti el personaj opinioj aparte, sed des pli el la plej taŭgaj opinioj de l' kapabluloj. Tia abunda ekzisto da "miaopinioj"

estas iom kondamninda. Ekzistas tro da emo al harfendado, tro da pedanteco.

"Forigu la kutimon pensi en la gepatra lingvo — penu pensi rekte en la internacia," t.e. pensi internacie, pensi laŭ la postuloj de Esp. pri forigitaj nacilingvaj kutimoj. Vortoj facile parolataj, sed malfacile efektivegeblaj. Kiom da e-istoj povas pensi, paroli kaj skribi neinfluate de la gepatra lingvo? Kiom multaj povas ĉirilate kontentigi ĉies postulojn? Kaj kiu estas kapabla prijuĝi? Kelkaj lingvistoj eble. Tre ofte oni parolas pri naciismoj, germanismo, slavismo, skandinavismo, ktp. admonante: forigu ilin! La afero estas interesa, kvankam iom implikita. Oni ja povas demandi al si, kiu esprimo estas nacia, kiu internacia? Legante verkon de eminenta esperantisto-verkisto, ĉu oni povas fidi al ĝi — ĉu ĉiu frazo, ĉiu esprimo garantias pri internacieco? Ĉu mi povas eltiri el la teksto miaopinie bonan belan esprimon por posta uzado, ne riskante, ke mi uzas ekz. germanismon?

La tre ŝatata D-ro Anakreon Stamatidis, responde al Ioseka verketo, skribis interalie al mi: "Mi trovas vian stilon tre bona. Laŭ la vicordigo mi supozas, ke vi scipovas la francan aŭ germanan lingvon, aŭ eble ambaŭ. Esperanto, kiel sciante, havas sian apartan stilon kaj ni devas kiel eble plej forte forskui kaj forigi la influon de aliaj lingvoj, eĉ de nia gepatra...."

Tiu d-ro estas unu el la multaj estiminduloj-eminentuloj de Esperantujo kaj ni supozu, ke lia scio de 12 lingvoj ne ŝtelis a li la klarvidon por prijuĝo. Lia multlingveco ebligis al li trovi influon de germana aŭ franca lingvo, spite de tio, ke mi scipovas nenium el la nomitaj lingvoj.

Mi permesas min rigardi la problemon, kia ĝi unuavide aspektas. Nu, kiel dirite, sciante nek la francan, nek la germanan lingvon, kiel mi povas havi kutimojn de tiuj lingvoj? Povas esti, ke mi, legante literaturon franc- kaj germanevenan (t.e. de germanaj aŭ francaj verkistoj) en Esperanto, lasis influi min.

Sed, do la verkintoj ne povis forigi la influon de la koncernaj gepatrolingvoj, kio siavice ankaŭ influis min. Se tio estas vera, ĝi ankaŭ pravas, ke la afero tiamaniere fariĝas ankoraŭ pli komplikita. Restas ankaŭ alia iom mistika afero.

Kiel estos al mi eble obei lian proponon pri forskuo de influo de l' lingvoj, kiujn mi ne scipovas? Kie komenci, eĉ ne sciante kiel aŭ en kioma grado mi estas influata?

La solvo de la de mi supre prezentita problemo sendube estas: La longtempa influado de germana kaj franca lingvoj (ankaŭ de la angla) sur la svedan rezultigas siavice al ekziston de germankaj francismoj en nia uzado de Esperanto.

Mi disponas ne nur pri verkoj de francoj kaj germanoj, sed ankaŭ pri tiaj de slavaj kaj aliaj verkistoj en Esp. — kial la lastaj ne samgrade influis min je stilo? La plej multaj libroj, kiujn mi legis de unu sama verkisto (mi kredas la samon pri ĉiu esperantisto) estas la *Zamenhofaj* — aŭ tradukitaj aŭ originalaj. Laŭdire la majstro la plej multe disponis pri internacia stilo, kial lia stilo internacia ne influis min? Ĉu la internacia do estas tiom malfacile transportebla en la cerbon de — precipe neklera — esperantisto, ĉar kutime nur esceptokaze oni aŭdas pri esperantistoj, kiuj distingas sin per internacia stilo. Tio pruvas, ke internacia stilo estas ne facile havebla, — unue oni pensas gepatralingve, nur poste, duavice....

Ordinare stilo simpla kaj klara estu tia haviginda por kiu peni estu ĉies devo. Simple, klare kaj koncize skribi kaj paroli, — tiu mala afero al la naciaj lingvoj — sen poezia maniero superflua, jen la celo nepre atingota kaj devo nepara por ĉiu esperantisto. Tiu afero verŝajne estas pli konsiderinda, tiu kapablo pli akirinda ol la penoj pri internacia stilo t. e. (ĉu ne?) esprimoj, frazkonstruoj, kiuj ne estas trovataj en naciaj lingvoj aŭ mezaj inter ili. — Mi ja tre bone komprenas, ke ankaŭ Esperanto devas posedi fine unuecan bazon rilate esprimojn, uzadon de la afiksoj, stilon ktp. sed verŝajne la tempo, kiam la lingvo havos ĝin en ĉiu rilato, estas malproksima, eĉ ke ĝi estas neebla pro la multnacia uzado.

Mi kredas, ke jam ekzistas du lingvoj en la sama Esperanto — la lingvo de la popolo — kaj tiu de la intelektuloj. Same estas ja pri ĉiu vivanta lingvo, kiu, kiel uzantojn havas la du kategoriojn. Oni povas supozi, ke la lingvo de l' ne-intelektuloj ne estas malpli bona, ĉar ambaŭ kategorioj ja povas egale bone

komprenigi sin, temas nur pri la formoj. Pravaj estas la vortoj, cititaj de Vi en "Sonoj kaj vortoj de Esp.": 'ni estas antaŭ du lingvoj lingvo de kleruloj, lingvo de popolo."

Ne ĉiuj esp.-istoj majstre regas la lingvon, sed ne estas necese, tian celon ne havas Esperanto. La unua tasko estu fari esperanton komprenilo por diversnaciaj homoj. Jen estas la kerno de la afero. Se mi per Esp. povas komprenigi min al alilingvulo — sen troa eleganteco — mi dankas la internan ideon de Esperanto kaj mi agas konforme al la celo. Se krom tio mi elokvente parolas — jes, mi do devas danki ke mi estas naturdorlotita per tiu eco. Cetere la belaj vortoj kaj elegantaj esprimoj estas afero flanka — la plej multaj homoj kutime lasas tion al la poetoj. —

La homaj ebloj atingi bonan rezulton je entrepreno estas diversaj. La inklino kaj energio ĉirilate ludas gravan rolon. Nur tre malmultaj atingas majstrecon. Ni "mekvalituloj" faru la plej bonan de la cirkonstancoj. Kiuj ne povas havi perfektan scion pri la plej subtila parto de la lingvo Esperanto, tiuj tamen ne devas ne peni laŭkapable veni kiom eble plej proksime al la modelo. Sub unu punkto Vi ankaŭ demandis kion mi studis rilate lingvojn. Al tio la respondo mia estas facila: Krom tiu de Esperanto, mi studis nenion gramatikon. Kvantam tre penoplena en mia situacio, la okupo estis kaj restas interesa. Mi estas feliĉa se mi iom sukcesis en miaj klopodoj pri Esperanto, pri kio juĝi Vi ja estas la plej kapabla.

Nun mi dankas Vin, sinjoro, pro tio, ke vi pacience tralegis mian babiladon. Per la iom ampleksa komentario (bonvolu pardoni min!) mi celis nur montri detalon de la multaj malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj devas batali neinstruitulo. Ankaŭ, tre estimata, bonvolu rigardi ĝin ne kiel kritikon, kiun fari mi tute ne havas iun rajton, sed volu rigardi ĝin kiel cerbumon de "serĉanto", mi petas.

H. F.



Reklamaffischer,

lämpliga att användas som reklam för kurser o.s.v. kunna beställas hos Svenska Esperanto-Förbundet. Pris pr styck 5 öre.

XIII-a kongreso de SAT la plej granda ĝis nun.

600 partoprenantoj. — Bonega organizado kaj granda kontento.

La XIII-a kongreso de SAT, kiu okazis 5—10 aŭg. en Stokholmo, fariĝis laŭdire la plej sukcesa ĝis nun en la historio de SAT. La granda partopreno — 600, el kiu cento da eksterlandanoj —, la brila kaj favora vetero, la bonaj organizoj, ĉio faris sian eblon por sukcesigi la kongreson, kaj vere la laboristaj esperantistoj povas kontentiĝi en la konvinko ke ili faris bonan laboron. Ni, "la burĝuloj", sincere gratulas al ili.

La malfermo de la kongreso havis apartan solenecon ĉar la ministro Arth. Engberg tiam paroladis, kaj en procesio tra la urbo partoprenis ne malpli ol 1000 personoj. La parolado de la ministro estis bonefika kaj eleganta. Ceestis la solenon ĉ. 1000 personoj. Grandan intereson ankaŭ vekis la kolektiĝo ĉe Skansen, kie laŭvice parolis la eksterlandaj partoprenantoj kaj koncertis la Tramista orkestro. La du malfermaj manifestacioj estis kaj belaj kaj efikaj.

Lunda akcepto de la urbo en la urba domo iĝis impona, kaj tie en la Ora Salono favore parolis al la kongreso la prezidanto de la urba konsilantaro Knut Tengdahl.

La kongreso faris du vizitojn, kiuj trege interesis al la kongresanoj, al la bak-ejo kaj centra provizejo de "Konsum" kaj al "Luma" (kooperativa fabriko por elektraĵ lampoj), kaj fine oni persipe ĝuis la belecon de la ĉirkaŭaĵoj de Stokholmo veturante al Tollare kaj Gustavsberg. Tie ankaŭ okazis la fermo de la kongreso.

La kongreso parolis por Valencia (Hispanujo) kiel loko por la proksimjara kongreso.

Svenska Esperanto-Förbundets handböcker.

S.E.F.'s medlemmar torde observera det med denna tidning följande prospektet om Förbundets nya skriftserie, som säljes till nedsatt pris till förbundets medlemmar. N:r 1, Huru leder man fortsättningskurser i Esperanto?, föreligger färdigt.

Svensk Radio.

Med anledning av esperantisternas petition har Radiotjänst upptagit till allsidig behandling språkundervisningen pr radio. Tills denna avslutats fortgå esperantohalvtimmarna som vanligt första söndagen varje månad kl. 10. Början skedde 3.9. då Riksdagsman Ernst Erikson talade om sommarens kongress. Den 8 oktober talar postmästare Teodor Julin om arbetsårets uppgifter. I Brevlådan komma aktuella nyheter och undervisning efter Seppik-Malmgrens Systematiska lärobok.

Sveda profesoro

fama kaj en sia propra lando kaj en aliaj landoj, en tiu ĉi jaro estis eksterlande. La profesoro estas eksterordinara lingvisto, kaj ankaŭ nian lingvon li bone scias. En eksterlando oni multe miris pro tio, ke la profesoro, kiu scias tiom da lingvoj, tamen lernis Esperanton, sed la profesoro simple respondis:

— Kompreneble mi lernis Esperanton ĝuste por ke mi povu paroli ankaŭ kun tiuj kiuj ne scias aliajn lingvojn.

"Verdaj rokoj".

Många års önskemål förverkligades i våras i och med att förbundets sekretariat fick egen lokal på Fredsgatan 4 i Stockholm. Initiativtagarna räknade med, att i förbundet skulle finnas ett antal medlemmar så besjälade av intresse för Esperanto-saken, att de skulle vilja offra 1 krona per månad för att ge förbundet möjlighet att hålla sig med egen lokal.

Redan ha ett antal personer i Stockholm med nyssnämnda syfte bildat understödsföreningen "La verdaj rokoj". Men hela Sveriges esperantister måste vara med, om det skall bli tillräckligt stöd.

Bliv alltså en av "La verdaj rokoj" genom att insända avg. till S.E.F.'s postgiro 2012, Stockholm med uppgift om pengarnas användning.

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

Afabla leganto, bonan laboron! Vi estas scivola, kio okazis dum via somera ripozado en la verda mondo, legu do la interesaĵojn de la esperanta gazetaro:

Esperanto (Julio 1933). El la artikolo de Edmond Privat (Retrovita unueco) ni citas la jenajn frazojn: "La Esperantistaro donacu al si kvin jarojn sen organizaj diskutoj kaj ĝia laboro denove trudos sin al 'a atento de l' mondo. Iru al diablo ĉiuj malspritaj distingo pri 'oficiala' aŭ 'neoficiala' kaj regu nur la entreprenemo por la afero mem! Tiam rekreskos la flugiloj de la facila vento."

El *Literatura Mondo* ni citas tri mongolajn proverbojn: 1) Unu homo ne estas homo, unu fajrero ne estas fajro. 2) Milmeĵla vojo komenciĝas per unu paŝo. 3) Ne montru la fumon el naz-truoj, eĉ se fajrego brulas en via brusto. (Bonaj konsiloj al ĉiuspecaj Esperantistoj.)

Heroldo de Esperanto: (9.7.) La "Orientinduja Centra Esperanto Organizo" fondiĝis.

El la 16.7-a numero: *Iu Francesko Fürst aŭ Franc Ferengi (hungaro) ekspluatas la trofidemon de pluraj samideanoj* En la averta de Lienhardt kaj O. Saŭr del. UEA oni priskribas plurajn trompojn eĉ ŝtelojn de la nomita "samideano", kiu estas mezkreska, juna viro, (inter 22—25 jaroj), kun malhelblondaj haroj, flue li parolas Esperanton kaj la germanan lingvon kaj iomete la francan. Kun granda bedaŭro ni registras la averton kaj forte ni akcentas: *Gar-du vin de la parazitoj!*

La 6-an de aŭgusto ni legis: 20 tre eminentaj britaj profesoroj kaj edukistoj subskribis manifeston pledantan por la lerneja enkonduko de Esperanto.

En la 32/33 n-ro ni legas, ke la konsilantaro de la franca departemento Seine voĉdonis deziresprimon favore al la instruado nedeviga de Esp. en lernejoj. Pli frue la jenaj departementoj decidis simile: Alpes Maritimes, Bouches-du-Rhone, Hautes Alpes, Allier och Marne.

"*La Esperanta Gazeto*" — kiu aperas ĉiusemajne en Amsterdam — okupas sin plejparte pri la mondpolitiko. Tamen ni elpinĉas la jenan "sekvinberon": Patro: "Kiam mi estis knabo, mi neniam mensogis." Filo: "Kiam do vi komencis, paĉjo?"

El *Scienca Gazeto*: "Pano fabrikita el ligno estas unu el la sensaciaj novaĵoj. Prof. F. Bergius, germana Nobel-premiito estas la fabrikinto. (Kolosa perspektivo! La senlaboruloj baldaŭ povos formangĝi siajn tablon kaj seĝon, se ili ne havos alian manĝaĵon!)

La julia numero de "*Sennaciulo*" krom la jarraporto multe okupas sin pri la skismo, okazinta dum pentekosto en Wien, kiu denove plu disigis la esperantistan laboristaron.

El la "*Interligilo de l' P.T.T.*" (centra organo de fakinformoj): "La Esp. Turista Komisiono eldonis poŝtkartojn kun Esp. teksto, ili estas vendataj en ĉiuj poŝtejoj de Estonujo."

Internacia Polica Bulteno: En Paris: Oficiala kurso por policistoj en Esperanto. Sukcesintaj similaj kursoj en Praha. En Bern estas 20 esperantistaj policistoj. La "Internacia Radio Polico" oficiale uzas Esperanton, "tiun modernan batalilon kontraŭ la krimuloj internaciaj." (Junia n-ro).

El la "*Pirato*" (unua numero aperis en junio) ni citas la jenajn datojn: Kajeraroj por Satiro, Humoro kaj Libereco.. relativa. Sipestro: Raymond Schwartz. Redakcio: 5, Avenue Gallieni, Courbevoie (Seine) Francujo. Hejma haveno kaj administracio: J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris 14-e. Kaperas ĉiumonate. Jarabono 12 fr. fr. La enhavo estas simile sprita.

Germana Esperantisto (Julio) Plej interesaj estas la novaj statutoj de GEA: La gvidanto devas esti nacisocialisto kaj li elektas naŭ konsilantojn kaj la estron de la loka grupo; ktp.

"*The British Esperantist*" raportas pri la angla eldono de "*La vivo de Zamenhof*".

La "*Socialisto*" (Julio): Al la Aŭstria Laborista Societo apartenas 53 grupoj kun 1729 membroj.

Fersil.



Dalekarlia distrikto

de S. E. F. jarkunvenas, *dimanĉe la 8-an de Oktobro* je la 1-a h. a. t. en *Arbetareföreningen, Falun.*

Pritraktaĵoj laŭstatutaj.

Muziko, Kanto.

Parolado de s-ino Jansson el Estonio.

Grupoj kaj unuopaj esperantistoj estas kore bonvenigataj.

Por La Estraro P. K.

Ordboksarbetet.

Då många torde undra, om ej den svensk-esperantiska ordboken snart är färdig, vilja vi härmed meddela att ordboken är uppsatt från början t.o.m. bokstaven R. Resten är granskat. Granskning, renskrivning, sättning och tre- eller fyrdubbel korrekturläsning tager sin dryga tid, och vi kunna ej fixera någon tidpunkt då ordboken skall föreligga färdig.

Den som väntar på något gott väntar aldrig för länge, heter det. Vi kunna försäkra att den nya svensk-esperantiska ordboken kommer att bliva mycket innehållsrik och till stor nytta, när den en gång kommer.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Till nästa nummer

ha måst överstå all text för "Kroniko", referat från flera distriktsmöten m.m. Detta har måst ske, enär sept.-numret är ägnat åt reklam för nästa års kongress. Detta nummer kommer att spridas i några tusental även i utlandet.

El la "Revue Orienta" ni prenas kelke da adresoj por korespondado: 1) Osamu Isiga, (23-jara studento, filatelisto) Takami-tyo 5, Jawata-si, Japanujo. 2) S-ro Cuĉija Hideiĉi, 145 Kubo-ĉo, Onomiĉi-ŝi, Japanujo. 3) S-ro Kazuma Harada ĉe Hokkaido Banko, Obihiro, Tokaĉi provinco, Hokkaido, Japanujo.

LIBROJ KAJ GAZETOJ

MINNESLISTA för SKOLUNGDOMEN

(Memora listo por lernantoj) estas utila kajero. Ĝin eldonis Nordiska Bokhandeln (Norda Librovendejo), Stokholmo, kaj dank' al red. Eive ĉe eldonejo "Tiden" oni en la 28-paĝa kajero trovās ankaŭ unu paĝon esperantan. Ĝi enhavas diversajn sciigojn pri Esperanto, gramatikajn regulojn, tekstajn provojn, i.a. tradukon de "Gubben Noak" k.t.p. Ĉar la kajereto pro sia interesa enhavo por nuntempa moderna junularo certe estos tre dezirata, la propagandon oni devos konsideri tre efika.

FRIIS: ESPERANTO LAEREBOG (Eld. Dana Esp. Librejo. Dua eldono. 108 paĝoj.) — Bone konstruita gramatiko kun fundamentaj klarigoj, zorgemaj informoj pri la historio, movado ktp. Anekdotoj freŝigas la tonon de la libro. Sed kial estas uzata la vorto "vando" anstataŭ la oficiala "muro"?

Szilágyi.

Studera systematiskt.

Under förra studieåret försålles 8000 ex. av Seppik-Malmgrens roande och instruktiva lärobok "Systematisk kurs i Esperanto". Kommer detta rekord att slås i år?

Rekvirera läroböcker av

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1.

Verkoj de Francisko Szilágyi.

Träns la Fabeloceano (novelaro)

(broŝurita)

Prezo: Kr. 2:75

Poemaro el Hungarlando (Poemtradukaĵoj el la hungara) Prezo: Kr. 1:20

Genthon — Szilágyi: "Pentroarto en la malnova Hungarujo" Prezo: Kr. 15:—

Haveblaj ĉe:

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Stockholm 1.

Tre nya böcker:

Huru leder man fortsättningskurser i Esperanto.

En handledning för studieledare av *Einar Dahl*.

N:r 1 i serien Svenska Esperanto-Förbundets handböcker.

Pris kr. 1:— (förmånspris för medlemmar av S.E.F. 0:50).

Barbro kaj Eriko.

L e t e r a r o m a n e t o.

Av *Alois Schneider* och *Magda Carlsson*.

Tvenne unga esperantisters korrespondens. En intressant och trevlig bok för de nya esperantisterna; lämplig som läsebok i kurser.

Pris 60 öre.

Dialogoj kaj komedietoj.

Av *Einar Dahl*.

Det goda mottagande förf. första bok (Dialogoj en Esperanto) fick, har föranlett honom att publicera ännu en samling småstycken av enkelt och roande innehåll.

Pris 50 öre.

Förlagsföreningen Esperanto upa.

Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578

Rakklingan Esperanto

är en verkligt god rakklinga. Tunn, skarp, hållbar, billig. På flera platser ha flera hundra, upp till tusen klingor redan sålts.

Pris pr st. kr. 0,20, pr paket om 10 kr. 1:75.

Återförsäljare önskas. God förtjänst.

Förlagsföreningen Esperanto upa.

Stockholm 1.

Deltagare i SEF:s årsmöte i Norrköping

som beställt men ej erhållit kort över kongressdeltagarna (även sådana som då ej beställde) kunna få sina kort genom hänvändelse till *Fotograf H. Leopold, Slottsgatan 152, Norrköping*.

Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo.

La fervore atendita Scherer-libro nun estas mendebla ĉe ni. Plej interesa dokumento. Multaj originalaj bildoj.

Prezo: broŝ. kr. 5:50, bind. 7:75.

Kongresa Jubilea Libro.

"*LA ARGENTA LIBRO*", enhavas 24 priskribojn pri la okazintaj universalaj kongresoj de Esperanto.

Prezo kr. 1:20.

Förlagsföreningen Esperanto upa.

Stockholm 1.

Korespondado.

Ĉu estas sveda samidean-in-o kiu deziras korespondi kun angla 40-jara instruisto. Preferas iun kiu interesigas pri lingvoj. *E. A. Furmston*. 41, Norfolk Avenue, *Sanderstead*, Surrey, England.

Roberto Farkas, Pécs, Pucher-u. 7, Hungarujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi per malnunaj Allers-jurnaloj (el jaro 1928, 1929 aŭ 1930) kun gesamideanoj.

Leterkesto.

N. O-n, Höör. Dankon, ne loko nun, eble en proks. n-ro.

ROBERTO FARKAS, Pécs, Hungarujo. La anoncon vi povas pagi per viaj monoj.

A. P-m, U-a. Dankon, tro longa. Pro la multa porkongresa propagando ni devas "tranĉi" multe de la "kronikaĵoj".

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTOS OMBUD



Alunda: Gösta Eriksson, Klev.
Arlöv: Sven A. Sundin, Box 38.
Billesholms Gruva: Nils Welander.
Boden: Hjalmar Pettersson, Parkg. 22.
Borås: Viktor Ekström, Söderkulla 33.
Boxholm: Knut Hallin, Storg. 10.
Ekestad: Birger Larsson, Box 19.
Ekshärad: Arnold Hall, Hedegård.
Eksjö: L. Pehrsson, Sydbanken.
Enköping: Emanuelssons Pappershandel,
Kungsgatan 16.
Eskilstuna: H. Sandbergs Bokhandel.
— B. Chressman, Vinkeln 1312.
Fagersta: Birger Eklund, Järnvägen.
Falkenberg: John Larsson, Box 40.
Falköping: G. A. Tholin, Linnégat. 1.
Falun: Einar Anselius, Åsgatan 86.
Fyrunga: Erik Brenander.
Gislaved: P. B. Carlson, Storgatan 7.
Grums: Georg Nordling.
Gyttorp: Thure Johnzon.
Gävle: G. Bengtsson, Tullkammaren.
Göteborg: N. J. Gumperts Bokhandel.
— Erik Ekström, Vegagatan 10.
Hallsberg: Erh. Wärn, Box 925.
Halmstad: J. M. Ahlström, v. Möllers-
gatan 1.
Heby: Leander Ström, Strömsvik.
Hudiksvall: H. Svensson, Håstavillan 10.
Hälleforsnäs: Elof Larsson.
Hällekis: Helge Frisk, Stakeklev.
Hällevik: H. Ysner.
Hälsingborg: Hedéns Bokhandel.
— Killbergs Bokhandel.
— Lisa Larssons Bokhandel, Söder-
gatan 17
— G. Henriksson, Brommagat. 32.
Härnösand: A. A. Sjölund, S. Brännan.
Hässleholm: Fru Elin Fors, Österg. 28.
Höganäs: Per E. Nilsson, Långgatan 6.
Höör: Billingska Bokhandeln.
Jönköping: Knut Jensie, Kanal. 57.
— Ernst Juneby, Kanal. 57.
Karlskoga: Sune W. Ahlm, Box 673.
Karlskrona: K. L. Nilsson, Ehrens värds-
gatan 5.
Karlstad: H. Johansson, Box 76, Råtorp.
Katrineholm: Elof Ohlsson, Fredsg. 43.
Kavlås: Erland Björkman, Kungslena.
Kil: H. Nordling, Järnvägsstationen.
Kilafors: Martin Berglund, Frivy.
Kiruna: Aron Nilsson, Kv. 123—7.
Klippan: Nils Björk, Tvärby.
Kumla: Fritz Ström, Box 139.
Kvicksund: Holg. Ekbladh, Skogsbacka.
Kvitsleby: Torild Grönlund.
Kävlinge: Nils Linérs Pappershandel.
Landskrona: E. Olsson, Hantverkareg. 19.

Lidköping: Otto Lindvall, Vinbergsg. 10.
Linköping: Harry Nilsson, Trängg. 6.
Ljusne: Holger Svensson, Box 423.
Luleå: E. Blomkvist, Skomakareg. 18.
Lund: Olle Olsson, Nils Bjelkegatan 6.
Malmberget: J. Lalander.
Malmö: Gösta Henriksson, Ystadv. 7.
— Karl Österholm, Agnesgatan 7.
Mora: G. H. Johansson, S. J. 2.
Motala: C. Hallros, Bispmot. Handelstr.
Motjärnshyttan: Yngve Nordström.
Munkedal: J. A. Hansson.
Munkfors: Boris Ekvall, Bl. 297.
Mölnlycke: Eric Brandin, Ericstro.
Norrköping: J. Pihlström, S. Promen. 19.
Nybro: K. F. Lindqvist.
Nynäshamn: Ernst Ek, Stathmosv. 2.
Porjus: Ossian Lundberg, Postlåda 150.
Råsunda: V. Appelkvist, Stråkv. 64, II.
Sandviken: Sven Wallner, Box 3124.
Sjoberga: Walter Johansson, Höjen.
Skara: G. A. Stahberg.
Skutskär: Evert Kjellin, Stadsplan 91-4.
Slöinge: J. A. Nord.
Stenstorp: Hugo Sköld.
Stockholm: Förlagsföreningen Esperan-
to, Sveavägen 98, 5 tr. Tel 31 65 01.
— Biblioteksbokhandeln, Biblioteksg. 12.
— Bokhandeln, Vasagatan 48.
Storuman: Gunnar Carlsson, Box 26.
Strömsbro: Nils Larsson, Vretbacka.
Sundsvall: Th. Farm, Epidemivägen 5.
Svedala: Henning Bengtsson.
Södertälje: Eric Grahn, Algatan 23.
Tidaholm: Nils Brobeck, Bäcksg. 7.
Tierp: Gösta Eriksson, Box 600.
Torsby: Gunnar Svensson, Box 68.
Torskors: Frithiof Ahnfeldt, Inglatorp.
Trollhättan: Sven Nydén, Nygatan 2.
— Allan Hälls Pappers- & Musikhandel.
Trälleborg: Hj. Olsson, Repslagareg. 8.
Uddevalla: E. Dahl, Ridhusgat. 6.
Umeå: Sigfrid Pettersson, Öbacka.
Uppsala: Fritz Lindén, Auroragatan 12.
Vallsta: Walfr. Johansson, Box 30.
Varberg: Valfrid Göransson, Götag. 14.
Varola: Sven Strand, Nykvarn, Törnäs-
torp, Skövde.
Vartofta: K. A. Bergström.
Visby: Vessman & Petterssons Bokhan-
del, Adelskatan 5.
Värtan: Gerhard Johansson, Järnvägen.
Västerås: G. Nilsson, Kryddgårdsgat. 12.
Atvidaberg: Walter Söderqvist, Hyttg. 1.
Örbyhus: Petrus Fredlund.
Örebro: Sigurd Ekendahl, Klostergat. 27.
Örnsköldsvik: C. E. Backlund, Nyg. 37.

HANSA

STOCKHOLM

Aktiekapital och reservfond

Kr. 6.000.000

Telefonanrop: HANSA



FÖRSÄKRING

Ombud: Kamrer Ad. LARSON.

